

OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

3-a JARO 1934	REDAKTEJO kaj ADMINISTREJO Galileo, 40 - Barcelono (Sans)	APERAS MONATE Julio-Augusto	SOCIA SIDEJO Galileo, 40 - Barcelono (Sans)	N-oj 26-27

IOM PRI «SAMIDEANOJ» NEŬTRALAJ (?)

KIEL NEŬTRALULOJ (?) PAROLAS — KIEL FAKTE ILI LABORAS

Ni represas ĉi tie artikolon, tre interesa por nia vidpunkto, (aperinta en marto de 1934) el «Torĉo de l'Edukistoj», organo de "Internacia Federacio de Esperantistaj Progresemaj Edukistoj" (IFEPE).

Per ĝi, la k-doj konstatos la dirojn ĉiamajn de ni. Ĉiuj ni akiru spertecon, k ni estu viglaj en la batalo kontraŭ kapitalismo, kiu kreas la mizeron, la militojn, faŝismon... Kaj malmoraligas ĉion pro individua posedaĵo de fontoj de riĉaĵoj kaj laboro. Gek-doj, antaŭen ĉiam! La venkego estas tre proksima en Hispanio! Ni estu firmaj gvardianoj de Proleta Revolucio, ĉiam gardstarantaj por ĝi! Deĵoru, do, de nun ĉiuj proletoj k kamparanoj sendepende de penso kaj frakcio. Niaj brustoj estu unu sola fronto kun unu sola penso: «detrui burĝan sociordon, ĝis radikoj, por ĉiam.» Ni ne ĉesu en la batalo ĝis la atingaĵoj ne estos plenumitaj! Antaŭen sen timo, kamaradaro!

Redakcio

Ekde fondo de I.F.E.P.E, ni ne ĉesigis denunci la faŝistiĝon de la plejmulta parto de la neŭtrala Esperanto-movado. Perfidis la pacidealon de Zamenhof, kiun ili demagoge propagandis. «Heroldo de Esperanto», «Germana Esperantisto», Internacia Pedagogia Revuo»..., kiuj subite kaj cinike proklamis sian aliĝon al faŝismo. Perfidis la Saksa Ligo de Esperantistaj Geinstruistoj, kiu gvidis T. A. G. E. (Tutmondan Asocion de Geinstruistoj Esperantistaj) kaj redaktis «Internacian Pedagogian Revuon» kaj nun eldonas per Hitlera mono «Novan Germanlandon», per esperantan faŝistan propagandilon dissendatan 10.000 ekzemplere tra tutmodo.

Sed ankaŭ perfidas, same kiel en 1914, la tuta neŭtrala Esperanto-movado la homaran idealon de Zamenhof. La unueciga kontrakto de la lasta Kolonja kongreso estis nur vasta kompromiso de la tuta neŭtrala movado kun faŝismo. Oni konstatu, ke «Esperanto», organo de U. E. A. (1) ĉesigis publikigi socikritikajn kaj pacifismajn artikolojn, kiuj povus ofendi la germanan kaj alilandan faŝismon. Ne neŭtraleco antaŭ faŝismo, sed eĉ cedemo kaj flatemo. En «Esperanto», estas gratulata faŝisto Teo Jung, direktoro de «Heroldo».

La apero jusa de «Nia Gazeto», sub gvidado de eminentuloj el Ententaj landoj, tute ne signifas, ke parto de l'esperantistaro el UEA deziras havi «sendependan» organon, kiu ludus la rolon plenumitan dum multaj jaroj de «Heroldo de Esperanto». Ĝi certe kontraŭas al «Heroldo», sed ne kiel vera «demokratio» kontraŭas al faŝismo, nur kiel naciismo kontraŭas al alia naciismo. La germanaj esperantistoj sur sia gazeto estis laŭtigintaj la vokon: La mondo atentu... Hitler parolas! Sur unua numero de «Nia Gazeto» en ĉefartikolo pseŭdo-demokratio vokas: Eduardo Herriot parolas! Herriot la perfidinta demokrato nun en sama ministerio kun faŝisto Tardieu!

Ni senlace denuncos la perfidojn, trompojn, erarojn, malkuraĝojn. Esperantistaj edukistoj, ekkonsciu pri la situacio! Oni ne batalas la faŝismon, helpante ĝin. Ne kondamnas faŝismon tiu, kiu sin direktas sur sama vojo. Kiel vi rilatas al Milito kaj Faŝismo? Kion vi faras kontraŭ Milito kaj Faŝismo? Iu holanda instruisto ricevis de la faŝista Ligo Saksa de Esperantistaj Geinstruistoj la komision pluvivigi T. A. G. E. kaj Internacian Pedagogian Revuon (I. P. R.) — kompreneble, ne sur antifaŝisma vojo. Aperis ĵus nova kajero de «I. P. R.»

Vi vane trovus sur ĝi kondamnon de la Saksa Ligo, kondamnon de la faŝismiĝo de l'Esperanto-movado neŭtrala. La nova I.P.R. restas sur la sama vojo de Kolonja unueco kun faŝismo. Sur ĝi estas legebla alvoko al Viena Konferenco de «Esperanto - Praktiko kaj - Instruado», kiu okazos dum Pentekostaj tagoj sub prezidado de sanganta faŝisto Dolfuss! Neniu konscia edukisto povas miri pri tio. En pli kaj pli faŝistiĝanta Eŭropo la neŭtrala Esperanta-movado, al kiu apartenas I. P. R. kaj T. A. G. E., ne povas ne kunlabori kun faŝismo. T. A. G. E. kaj la nova I. P. R. apartenas al Kolonja fronto en kiu la samideanoj - demokratoj amikas kun la samideanoj-faŝistoj.

La energia protesto de la franca geinstruistaro kontraŭ la leviĝanta faŝismo, la 12-an de februaro strikrante kun la tutlanda laboristaro, povus supozigi, ke plejmultaj francaj esperantistaj edukistoj ankaŭ estas konsciaj entuziasmaj batalantoj kontraŭ faŝismo. Bedaŭre «Grupo de Esperantistaj Edukistoj» (GEE), konsistanta el 300 instruistoj, ĝis nun ankoraŭ ne montris konsekvencan sintenadon kontraŭ faŝismo. Sur lasta bulteno, gazeto «Heroldo de Esperanto» estas montrita, kiel aboninda en iu grupa raporto. Ni eĉ havis doloron konstati, ke sindikata instruisto ankoraŭ propagandas por IPR kaj TAGE kaj defendas la saksan ligon, kredigante, ke ĝi estas viktimo de Hitler. Ĉu erarego? Ĉu fitrompo? Ĉu GEE deziras kun la francia IPR-agento solidariĝi kun la faŝistoj de la saksa ligo? Argumento, ke la saksaj instruistoj estas nun for de TAGE, nenion valoras. Nenio malpermesas al faŝistaj edukistoj aliĝi al TAGE kaj aboni al IPR.

La nuna afero de TAGE-IPR havas jenajn karakterizojn:

1 — heredita kaj komisiita de faŝistoj (saksa ligo),

2 — malfermata al faŝistoj (Kolonja kontrakto),

3 — kunlaboranta kun faŝismo (Dolfuss...) Baraktado de GEE antaŭ gravaj problemoj de nia internacia movado kondukas tiun grupon al nekapableco agi kontraŭ faŝismo: nekuraĝante batali kontraŭ saksa ligo, kontraŭ TAGE, IPR, Heroldo, Kolonja fronto, tiu grupo ne kuraĝas partopreni la batalon de I. F. E. P. E. Tamen multaj GEE-anoj pru-

(1) Universala Esperantista Asocio, la organizo de neŭtrala movado en tutmondo.

CUESTIONES GRAMATICALES

Reconocimiento de las partes de la oración

Aquí hemos dado un bello artículo dedicado a todos los camaradas que se ocupan de la enseñanza del idioma Esp-o. El autor es el «Padre de los esperantístas zaragozanos», como así se le denomina, por ser el más antiguo de ellos y el forjador de todas las generaciones de esperantistas qae andan por la capital aragonesa.

Desde 1908 viene dando cursos incesantemente, sin descanso. No hay otro esperantista en toda España que cuente en su haber con tanta experiencia ni haya dado un ejemplo tan brillante de lo que debe ser un sembrador del Esp-o.

El camarada Emilio Artigas, miembro de PUIL. ha estado siempre a nuestro lado, y, por ser Maestro de profesión, sabe lo que enseña y cómo debe enseñarse.

Aprovechemos la lección admirable — botón de muestra de su experiencia y capacidad — que nos ofrece gentilmente, porque, como decimos, quizás ningún otro esperantista de Iberia podría dárnosla con la originalidad y autoridad que las suyas.

Nos servimos de la ocasión esta, para felicitarle y darle las gracias más expresivas, aconsejando a todos, a la vez, para que imiten al compañero Artigas en su perseverancia inigualada.

La Redacción

No está mal que quienes explicamos cursos de Esperanto nos comuniquemos alguna vez nuestras experiencias, nuestros procedimientos de enseñanza, nuestras dudas y los resultados más o menos satisfactorios que obtenemos.

No tenemos un cuerpo de profesores especializados y por ello, aun sin conocer profundamente el idioma, sino habiendo aprendido de un modo superficial las principales reglas, abrimos nuestros cursos y con el mayor entusiasmo y la mejor buena fé procuramos enseñar lo que sabemos, confiando en que alguno de los alumnos, con mayor capacidad y más conocimientos gramaticales que los nuestros, continuará en nuevos cursos, la enseñanza del Esperanto.

Esta es la realidad por cuanto entre el proletariado es donde mejor se ha comprendido la importancia del idioma internacional, pero nuestra escasez de conocimientos gramaticales nos impide usarlo con la debida corrección.

En los numerosos cursos de Esperanto que he dado, me ha parecido ser de la mayor importancia, procurar que los alumnos conocieran la diferencia entre nominativo, verbo y complemento directo, pero yo bien sé el disgusto que me ha producido ver que mis explicaciones eran escuchadas con atención simulada, por la poderosa razón de que no eran comprendidas a pesar de que no faltaba el entusiasmo por parte de los alumnos, ni por la mía.

Y voy ahora a tocar un punto concreto, que me ha hecho reflexionar muchas veces, para decir cómo lo he resuelto evitando el tedio que en otros cursos habían producido mis explicaciones. Me refiero al nominativo, sobre el cual he suprimido explicaciones tan fastidiosas como puede producirlas quien no conoce a fondo el tema que trata.

No me ha sido difícil conseguir que los alumnos conocieran el verbo y, ya en este punto, he hecho que produjeran una variante en el verbo. Vaya un ejemplo: "El árbol crece". Poniendo el verbo en plural *crecen* forzosamente he de decir *los árboles,* lo que nos dice que *árbol* es nominativo porque necesariamente el nominativo sufre las mismas alteraciones que el verbo. Otro ejemplo. "Con una gran tijera cortó las flores del jardín el jardinero". En una oración donde se produce el hipérbaton no es fácil a quien ignora, o apenas conoce la gramática, encontrar las partes de la oración. Pero siguiendo el procedimiento que me decidí a aceptar, hago que el alumno varíe el verbo y diga *cortaron* para buscar en seguida la palabra que sufre alteración, y, por cortos que sean sus conocimientos, ha de variar la palabra *jardinero* diciendo *cortaron.... los jardineros.* Las demás palabras pueden continuar y continúan sin experimentar variante alguna dejando la frase completamente correcta.

La pregunta *¿quién?* para buscar el nominativo no me ha dado el resultado que buscaba porque hay frases que se prestan a confusión como sucede en el primer ejemplo. "El árbol crece". ¿Quién crece? "*El árbol*". ¿Qué es lo que crece? "*El árbol*". Esta frase ha tenido perplejo a algún alumno porque no sabía si decir que *árbol* es nominativo o complemento. Con el procedimiento de las variaciones en el verbo no ha habido lugar a dudas.

Este mismo procedimiento me ha dado hecha la distinción entre las oraciones activas y las pasivas sin aburrir al alumno con largas explicaciones. Un ejemplo: "Fué tomada por el anciano la medicina que había de curarle". Pronto encuentra el alumno el verbo *fué tomada*, pero ¿cuál es el nominativo? Recurro al procedimiento de la variación y digo: "fueron tomadas". Inmediatamente encuéntrase la palabra *medicina* pue necesariamente ha de variarse diciendo "*las medicinas* y ya está el nominativo. Como ya no hay duda alguna respecto al nominativo, falta solamente que el alumno mismo vea si *la medicina* ejecuta la acción de tomar o la recibe. No hay duda de que la respuesta será exacta, y resta únicamente decir que si el nominativo recibe la acción es una oración pasiva y, si la ejecuta, es una oración activa.

Considero tan interesante conocer con la mayor exactitud posible estas reglas como el vocabulario, para evitar la pena que produce leer escritos en Esperanto, ricos en palabras, pero incomprensibles por una equivocada aplicación de la parte gramatical.

Otro punto que también me ha hecho sufrir, pero que después de conocer el nominativo me ha tranquilizado, es el acusativo; quiero decir, el complemento directo.

Tomemos verbos: *comer, lavar, leer, pintar.* Ninguno de estos verbos tendría razón de existir si además del sujeto que *come, lava, lee o pinta* no existiera una cosa que fuese comida, lavada, leída o pintada. Cuando he conseguido que el alumno se haya dado cuenta de que necesaria e imprescindiblemente tenía que existir algo que recibiera la acción del verbo les he dicho que estos verbos son los transitivos y esos objetos que reciben la acción del verbo son los complementos directos que están como acusativos. Otro ejemplo: "Yo escribo". Además del indivíduo que escribe tiene que haber alguna cosa escrita: Una letra, una carta, una poesía. Por lo tanto, letra, carta, poesía son los complementos directos, o sea, el caso acusativo.

Y como no todos los verbos tienen complemento directo, hay que presentar los contrastes.

Yo ando, él duerme, aquéllos corren. Ninguno de estos tres verbos exigen cosa alguna para que reciba su acción. La frase queda completa con el nominativo y el verbo, bastando únicamente fijar, si se quiere, alguna circunstancia de lugar, de época, etc. Sean estos los verbos intransitivos, y no he considerado necesario desmenuzar más la clasificación ante el temor de que la presentación de matices gramaticales reprodujera el tedio de otros cursos mios anteriores.

No se tome lo dicho como lección, sino simplemente como resultado de mis experiencias que expongo a los camaradas que expliquen cursos de Esperanto, esperando que el intercambio de nuestras respectivas experiencias ha de servir para rectificar nuestros procedimientos a fin de que nuestra labor sea provechosa. Téngase presente que en la mayoría de los casos es necesario que nos pongamos a explicar cursos de Esperanto cuando son todavía muy incompletos nuestros conocimientos sobre este idioma y casi nulos los que poseemos sobre el lenguaje nativo.

Zaragoza, 1-an majo, 1934.

EMILIO ARTIGAS

---

vis, ke ili klare konscias pri la situacio kaj jam aliĝis al IFEPE.

Batalo kontraŭ faŝismo postulas senkompromisan sintenadon kaj ŝtalan energion. Al ĉiuj esperantistaj edukistoj, ni senlace vokadas:

Kiel vi efektive batalas kontraŭ faŝismo sur Esperanta kampo?

Solvu por vi mem la dilemon:

Ĉu kunlabori kun faŝistoj per T.A.G.E kaj I.P.R.?.

Ĉu batali kontraŭ faŝismo per I.F.E.P.E kaj "Torĉo"?.

Ne sufiĉas instrui internacian lingvon al frata gelaboristaro, oni devas veki fortan senton klaskonscian, klerigu! instruu!

NOVA INSTRUA FORMO

LERNANT - KOMITATO

Malnova pedagogio estas tute ne taŭga por ĝin adapti al la bezonoj de la proleta klaso. Burĝa instruado estas kvazaŭ ĥaoso. Inter pedagogo kaj lernanto estas abismo. Proleta pedagogio kaj pedologio certe unuigos instruantojn kaj lernantojn, alproksimigante lernejon al socio. Instruantoj kaj instruistoj devas esti la plej bonaj kamaradoj kaj gvidantoj de la lernanto. Nur tiele lernanto estos utila je la estonteca plibonigo de la homaro.

Se ni celas laboradi por starigi pli justan soci-sistemon ol la nunan, tio estas, neniigi burĝaron kiel socian klason, ĉar ĝi jam naskis la sufiĉajn elementojn por ĝin anstataŭi, ni studu k serĉu ĉien ajn la aĵojn bezonatajn, kiuj karakterizas proletan klason. Ĉiu en sia posteno. Ĉiu laŭ sia specialeco penu labori. Ni, prolet-esperantistoj, estas jam en la nia, ĉu etendante nian influon laŭpove, ĉu lernigante esperanton kiel klaskonsciigilon k vigligante la malamon kontraŭ burĝaro.

Ni trastudu, do, la rolon de Lernant-Komitato, tial ke ĝi estas eltrovaĵo, kiu servas al proletaro k signifas gravan antaŭenpaŝon por nia celo.

Veki la atenton pri Lernant-Komitato al tiuj, kiuj estas ĉe instrua posteno, k precipe al kursgvidantaro de PUIL estas devo niaflanka.

Cetere, ni delonge konsilas la organizadon de Lernant-Komitato en ĉiu kurso prolet-esperanta, tamen estas verŝajne konstatebla fakto, ke la plimulto el nia profesoraro, t. e. la nervo de PUIL, ankoraŭ nek bone nek malbone esploris la veran sencon k signifon de tiu nova instrua formo, kaj konsekvence ili estas premataj de senpoveco por zorgi pri ĝi en la kursoj, kie ili instruas.

Malgraŭ ĉio, ni tute ne volas forgesi la eblajn demandojn, kiujn faris al si kelkaj kamaradoj -instruantoj: Ĉu vere Lernant-Komitato estas parto el proleta kulturo k ĝi enhavas bonan utilecon por proletaro? Ĉu ĝi estas ankaŭ aplikinda k aplikebla en ĉiuj esperantaj kursoj?... Ĉu ĝi povas nur esti organizita laŭ celo de PUIL., aŭ kiom da aplikoj ĝi havas?... Kompreneble, ĉi demandojn postulas tre klaran k necesegan klarigon. Lernant-Komitato estas parto el proleta kulturo, ĉar ĝi vidigas novan mondon al lernantaro k pere de ĝi lernantoj k instruantoj unuiĝas. Lernant-Komitato forigas ĥaosan instruadon. De tiam instruanto ne estas supera homo. Kvankam li orientas la instruadon. Lernant-Komitato estas kiu fakte mastrumas la kurson. Burĝeca influo malaperas. Lernantoj alkutimiĝas fari sugestojn por pli bone lerni k helpas tiamaniere laboron de l'instruanto. Plie, lernantoj sin sentas fieraj pro sia agado, ĉar ili scias, ke kolektive helpas antaŭeniradon de la kurso, kie ili partoprenas. Ili profitas bone la tempon k sub la influo de l'instruanto, se tiu ĉi estas konscia, ili fariĝas klasbatalantoj en proleta kampo.

Lernant-Komitato estas tio: ĉiam aplikinda eĉ aplikebla, sed ĉiam ni havu sufiĉe klaran ideon pri kiaj cirkonstancoj k medio ĉirkaŭas nin. Ruza laboro fariĝas necesega. Disvastigado de Esperanto postulas nian translokiĝon ĉien por ĝin instrui aŭ konigi. Ni bone scias, ke ne ĉiuj societoj k kulturaj organizaĵoj estas prolet-tendencaj, klasfrataj. Ekzistas aliaj, kiuj sin nomas kulturaj, nepolitikaj, ekzemple kooperativoj, Ateneoj, amuzejoj, k.t.p.. Ili tute ne volas trafi klasan celon, nek foje havas klasan aspekton. Tamen, ni komprenigu al kursanoj la utilecon de Lernant-Komitato por pli poste, kiam ni komprenus, oportune organizi ĝin. Krom enviciĝo al PUIL. pere de Lernant-Komitato de la kursanoj, kiuj volonte akceptas nian organizaĵon, la kamaradoj instruantoj okaze trovi malhelpaĵojn tiaspekte, ili ne forgesu la duan k indan aplikon. Lernant-Komitato starigas organizan principon. Moderna instruado devigas al lernantoj sin organizi en la lernejoj por pli efike lerni. Laŭ esperanta vidpunkto signifas fosi nian sulkon k malfermi vojon por la estontaj esperantaj kursoj ĉe tiuj ne klasaj societoj k kulturaj organizoj. Niaj klasaj interesoj faras de Lernant-Komitato efikan borilon, per kiu ni helpas iel ruinigon de burĝa kulturo k moralo k konsekvence, neniigon de burĝaro kiel klason. Ni eltiru tiujn gekamaradojn, kiuj ankoraŭ kuŝas en mallumo de kapitalismo. Ni apliku Lernant-Komitaton k ni ne plendos estonte ĝian servon. Ni ĉiam laboru laŭ klasa celo.

SURINYAC

NIAJ TASKOJ

Cuatro son estas tascas. Todo proletario esperantista, consciente de sus deberes de clase, no tendría que olvidarlas, antes al contrario, hacer todo lo posible para llevarlas a la práctica. Hélas ahí:

1 — Notando que nos convertimos en inevitables herederos del movimiento neutral esperantista, que sólo la clase obrera organizada logrará empujar adelante e introducir el idioma internacional en la práctica y uso cotidianos — nosotros hemos de *intensificar* el uso práctico del esperanto, *ampliar* nuestra correspondencia internacional y nutrir con informes directos los periódicos de lucha de clases en todo el mundo, *extender* la propaganda del esperanto para los fines sociales.

2 — Recordando que el esperanto es y debe ser considerado únicamente como instrumento para la realización de la solidaridad internacional y para establecer fuertes lazos internacionales. – Hemos de esforzarnos en hacer un trabajo educador y cultural entre los alumnos y entre los que ya conocen el esperanto. Hemos de enseñar el espíritu revolucionario del Socialismo internacionalista (cosmopolitismo socialista) y de la lucha de clases. Sólo actuando así garantizaremos un constante aumento de luchadores abnegados para nuestras ideas.

3 — Como la dirección de todo el movimiento esperantista finalmente ha de caer en las manos de los esperantistas obreros revolucionarios — es preciso que, aumentando el número de adeptos al esperanto y educando su conciencia de clase, cuidemos de que profundicen sus conocimientos del *esperanto*.

Hemos de preparar entre nuestras filas, a compañeros que puedan, en todas las ramas del saber, usar nuestro idioma internacional y de este modo tomar la dirección general del movimiento esperantista, que, hoy por hoy ya dejan visiblemente de sus manos los esperantistas neutrales y U.E.A. (Asociación Universal Esperantista).

4 — Una nueva clase social, ardientemente aspirando al cambio del orden social existente y a una ordenación de las injustícias y males presentes, debe lo más científica y objetivamente posible dar carta de naturaleza a su táctica en relación a tan importante problema, cual es el de la lengua internacional. La ciencia lingüística del pasado habiéndose desenvuelto en una base de cultura nacionalista burguesa — no ha querido, ni podido hasta el presente, y no logrará en el porvenir — dar los argumentos científicos necesarios para razonar la posibilidad de una lengua internacional. Menormente ha logrado demostrar y bien argumentar los senderos que son obligados para la adopción de la lengua internacional. Por tanto, usando los métodos del materialismo histórico, de la dialéctica marxista, — debemos en lo posible apoyar todos los esfuerzos tendentes a profundizar nuestros conocimientos acerca de los caminos usados por la evolución de las lenguas naturales y por la lengua internacional.

Los admirables métodos de la filosofía materialista basados en el concepto de la evolución social y en los principios de la lucha de clases — nos abren una perfecta posibilidad de argumentar científicamente y mostrar tales caminos de la creación lingüística colectiva, que hasta ahora han seguido y que en en porvenir el esperanto los seguirá también.

ERNST DREZEN

Vice-presidente que fué de la U.R.S.S., y actual Rector de la *Universidad Eléctrica* de Moscú.

Aliĝu multnombre al

Esperanta Laborista

Kongreso en Hispanio

XVI KONGRESO INTERNACIA

de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

en Valencia 3-8 Aûgusto 1934

Faktoj sen komentoj

Ni multfoje argumentis pri «neŭtraleco» klarigante per ne refuteblaj pensoj nian proletan sintenon.

Tiuj kiuj sin sentas fieraj «neŭtraluloj» – bedaŭrinde inter ili estas multaj ne konsciaj laboristoj — defendas per abstraktecaj vortoj neŭtralajn Grupojn. ĉar laŭ plaĉe povas ĉeesti Esperantajn kursojn aŭ festojn, organizitaj en la societo.

Nature, la novaj lernantoj k aliaj, kiuj ne konas esperantan movadon, ne komprenas, ke ekzistu du kampoj en la esperanta movado. Ili fariĝis esperantistoj en ĉi medio k konsideras kvazaŭ krimon dividi internacilingvan movadon; despli multe ili kondamnas nin, kiam ili konideras la «internan ideon» de Esp-o.

Ili kulpas nin pro tiaj disigoj, eĉ boncelaj proletoj kuraĝas diri, ke ni devas helpi k partopreni je neŭtralulaj Esperantaj aferoj.

Aliaj logike pensante diras: la plej multaj anoj el la neŭtralulaj Grupoj estas proletoj. En tiu kazo kial oni ne eblas ŝanĝi ĝiajn strukturojn, se la plej multaj anoj estas proletoj?

Ni devas respondi, ke ne ĉiuj proletoj estas klaskonsciaj; kontraŭe en Italio, Germanio k. t. p. ne ekzistus faŝismo.

For de nia penso dividi esperantistojn, se ili estas proletoj, ĉar la burĝoj ne *volas* esti samrajtaj al ni, nek aparteni al nia laborista klaso, do ili faras disigojn k kreas du kampojn ene de la homaro: la tutpovan burĝaron k la prematan proletaron.

Ni devas deklari, ke nia Unio estas proleta k en ĝin rajtas veni ĉiuj prolet-esperantistoj grupigitaj aŭ ne, sed iri influi sur «neŭtralulajn Grupojn» estas perdi tempon, ĉar tiuj kiuj fariĝis esperantistoj en tiuj medioj jam sin sentas feliĉaj, do ni ne «interrompu» ilian burgeĉan idilion.

«Neŭtrala» movado ne estas, nek povas esti «neŭtrala», ĉar ĝi naskiĝis en burĝa medio k per neŭtralula masko ĝi influas sur laboristajn organizojn eĉ tiom grade, ke ni devas atentigi proletojn por eviti disigojn inter ni. Estas faktoj, kiuj pruvas, ke ili semas disigojn kvankam ili sin nomu neŭtralaj.

Lastmomente ni povas montri ilian «neŭtralecon,» ĉar en VII.ª Barcelona especimenfoiro, okazinta de 2-a ĝis 17-a de Junio de ĉi jaro, ili disdonis anoncfolion kie troviĝas la adresoj de ĉiuj Barcelonaj Esperantistaj Grupoj, k du foje anoncas la adreson de Kataluna Esperantista Federacio, k tute ignoras la adreson de PUIL , ĉar ili «neŭtraladas» silentante nian proletan Union.

Ĉu ne ekzistas du kampoj inter la esperantistoj?, k se ni estas proletoj la aliaj kio estas? Ĉu «neŭtralaj»!?

BALLARUK

EL SABADELL

"Nia ĝis nun plej grava sukceso"

Verkis R. Arteu



Kiel jam kutime, nia Proleta Esp-o-Grupo ĉi jare aranĝis Esperanto-Ekspozicion okaze de l'Unua de Majo.

Tiun Ekspozicion ni povas enregistri, kiel la plej gravan sukceson de nia persista laborado.

Per laborista gazeto, flugfolioj, radiodisaŭdigoj k okaze de publika amaskunveno ni antaŭalvokis la laboristaron viziti nian Ekspozicion.

Per tiu Ekspozicio ni pruvis eĉ al niaj kontraŭuloj, kiel oni povas veki k. interesigi la vastajn amasojn al nia esperantomovado k al batalo kontraŭ la monstroj: Faŝismo k Milito.

La plejparta enhavo de l'Ekspozicio estis kontraŭfaŝisma k kontraŭimperiisma. Kelkaj sindonemaj k-doj sinsekve deĵoris por klarigi al vizitantoj la sencon de la multenombra k valorega materialo.

Bildaro prezentanta statistikojn pri armiĝado; militbuĝetojn de la ĉefaj kapitalismaj potencoj k la il. Revuoj «U.S.S.R. en konstruado», estis la materialo plej alloga k interese komentata. Ni povas diri ke ni faris per tiu Ekspozicio kvazaŭ revolucieton en la konscio de grandamaso da ne klaskonsciaj gelaboristoj. La loko, kie ni prezentis tiun Ekspozicion (ĉe Respublikana etburĝa Societo) estis tre oportuna pro la fakto, ke ĝi estas la plej ĉeestata de neklaskonsciaj laboristoj.

Ni daŭrigis la Ekspozicion dum 6 tagoj k ni kalkulas, ke ĝi estis vizitata de ĉ. 2.000 gelaboristoj. Krome ni devas noti la ĝojigan viziton de la esperantistaj gek-doj el San Cugat k Taraso. kiuj multe laŭdis pri la bongusta aranĝo de tiu Ekspozicio. Dum ĝi daŭris k aparte, ni disvendis kontraŭfaŝismajn fotokartojn.

Konstatinte nian sukceson, la gek-doj el San Cugat decidis ankaŭ utiligi nian materialon okaze de ilia vilaĝa ĉefa festo. Tiu-cele ili petis k sukcesis de la Vilaĝkonsilantaro aranĝi Esperanta-ekspozicion ĉe la Vilaĝdomo. Pri tio ni nur povas diri, ke ankaŭ ĉe tiu vilaĝo la Ekspozicio estis sukcesega.

Dank, al propagando de nia Eksp-cio ni povis malferni elementalan kurson.

Ĉi okazos ĉiu lunde k ĵaŭde ĉe sidejo de B.O.C. k estas gvidata de k-do M. Altarriba. En tiu kurso partoprenas 20 gelernantoj.

Antaŭ la datreveno de l'Unua de Majo, nia Esp-o-grupo, je mono de la Proletesperantistoj el Sabadell, verkis kolektivan salutleteron, kiu estis subskribita de pluraj proletorganizaĵoj k izoluloj. Tiu leter-manifesto estis forsendita eksterlanden al pli ol 60 lokoj.

Jen, do, skizita nia tasko en la proletesperantista kampo okaze de l'Unua de Majo ĉi jara.

Gek-doj! Antaŭen al fina venko! Ni multe ĝojus, se ni legos sur la paĝoj de «Proleta Voĉo» pri la aktiveco de alilokaj konkurantoj!

NOVAJ ESPERANTAJ KURSOJ :

BARCELONA

—Ĉe «Ateneu Enciclopèdic Popular» okazas elementalaj k superaj kursoj sinsekve. K-do, Cid gvidas la elementalan, k k-do Pólit la superan.

—«Akademio Enciklopedia Esperanto» malfermis lastatempe elementalan kurson, kies instruanto estas lastatempe k-do Anglès.

—«Ateneu Popular de Gràcia.» Instruas elementalan kurson k-do Ramon Fernàndez.

SABADELL

—«Escola Industrial de Sabadell» du esperantaj kursoj. Instruas k-do Viladoms.

TARRASO

—La aktivaj PUIL.-anoj de Tarraso krom la kurso el tiu-ĉi urbo ili gvidas kurson ĉe Monistrol de Montserrat.

KORESPONDADO

Laboristoj de la urbo Irkutsk (apud la lago Bajkal) deziras rakonti al vi, hispanaj k-doj, pri. —

Kiel Siberio ekzileja aliiĝis en «Siberion socialisman».

Junularo, Sportuloj, studentaro k ceteraj laboristoj deziregas korespondi kun vi kolektive k individue.

Ni povas abunde sendi fotojn, plakatojn, afiŝojn, gazetojn k ilustritajn leterojn pritraktontajn nian laboron.

Sendu multnombre Ni respondos nepre.

Nia adreso: USSR. Siberio.
Irkutsk, Str. Karl Marks, 21
Redakcio: «Vost. Sib. Komsomolec»

INFORMEJO DE PUIL

STR. HOSPITAL, 54 - Pral. - BARCELONA

LIBRA-SERVO

Ni rabatos al la membroj de PUIL 25% kaj por la ne membroj 20%.

K-do Germán Pólit. - Strato Laforja, 94, 2.º 2.ª - Barcelona.

TARIFOJ

Aliĝo al PUIL kun jarabono al «Proleta Voĉo»: 3'00 ptoj. Abonkotizo al «Proleta Voĉo» — jare 3'00 ptj. Ĉiu membro ricevas nian organon. La abonoj komencas en la unua tago de la jaro. Ankaŭ duonjaraj abonoj estas akceptataj. Membro-karto: 1 peseto.

Sendu la varbilon kun la mono al: Sekretario de P. U. I. L., Strato Galileo, 40, 2o- BARCELONO (SANS)

Presejo C. C. - Aribau, 137 - Barcelono